

La Programo de Esperanto Hamburg 2015

Ĵaŭdaj klubverseroj: en *Kulturladen St. Georg*, Alexanderstraße 16, 20099 Hamburg
19:00 h la membroj kolektiĝas en la kafejo. 19:30 h vespera programo laŭ la suba listo.

Decembro 2015

3a de Decembro 2015 *Piero Nissim: MAYN LIDELE – Miaj jidaj kantoj kaj aliaj kantoj*

Ni aŭskultos la kantojn ambaŭ jida- kaj Esperanta-lingve.

10a de Decembro 2015 *Sebastian Kirf: Novaĵoj de la Germana Esperanto Asocio*

La prezidanto de GEA, Sebastian Kirf, raportos pri la agado kaj la planoj.

19a de Decembro 2015 **SABATO** 18:00a horo: **Zamenhoffesto**

Bonvolu aliĝi ĝustatempe ĉe Gerald Roemer: [geroemer\(at\)t-online.de](mailto:geroemer(at)t-online.de)

Novembro 2015

5a de Novembro 2015 *Dominik Grauert: ODAKI*

Tiu-ĉi ludo kun bambusaj bastonoj estas la inverso de MIKADO (inversa nomo sen „M“).

12a de Novembro 2015 *Petro Chrdle: Eko-turismo*

Prelego (39 minutoj) filmita dum la 83a Germana Esperanto-Kongreso 2006 en Brunsviko.

19a de Novembro 2015 *Mélanie Maradan * Esperanto-grupo La Stelo*
Kiliba Esperanto Asocio en Kongo, Afriko – Prezento kaj diskuto de evoluprojekto

Ni havos gaston el Ĝenevo, la prezidantinon de la Esperanto-Klubo „La Stelo“, Mélanie Maradan.

Ŝi prezentos evoluprojekton kun Kiliba Esperanto Asocio en Afriko, en la Demokrata Respubliko Kongo, per filmo kaj fotoj. Gerald Roemer aldonos siajn informojn. Ni volas diskuti kun la ĉeestantoj, ĉu HES oficiale kunlaboru tiurilate kun KEA kaj La Stelo (por poste dicidi en la estraro), kaj / aŭ kion unuopaj membroj povos fari.

25a de Novembro 2015 **Merkredo 18.00 h Estrarkunveno**

Ekde kelkaj jaroj estas bona tradicio, ke ĉiu membro de HES povas partopreni kaj informi sin pri la agado de la estraro.

26a de Novembro 2015 *Astrid Lindgren: Emilo de Smolando*

Ni kune laŭtleĝas „Kiam Emilo enigis la kapon en la supujon“

La Programo de Esperanto Hamburg 2015

Ĵaŭdaj klubversperoj: en *Kulturladen St. Georg*, Alexanderstraße 16, 20099 Hamburg
19:00 h la membroj kolektiĝas en la kafejo. 19:30 h vespera programo laŭ la suba listo.

1a Hamburga Esperanto Kantokonkurso

Vere estis Esperantujo en Hamburgo. Okaze de la 111a jubileo de Esperanto Hamburg renkontiĝis sep kantistoj el kvar landoj je la 2a de Oktobro 2015 en kulturbutiko en kvartalo St. Georg por pake batali kaj gajni la unuan premion. Jam ĉe la provludado je posttagmezo sentebliis bona etoso kaj amikeco kaj eĉ dum la vespera konkurado plej gravis: ĉiuj gajnis.



Kapriol! el Nederlando malfermis la vesperon kun du novaj kantoj en tradicia mezepoka stilo, manfarita muziko per novaj kaj malnovaj instrumentoj kaj tiamaniere atingis la korojn de la aŭskultantoj kaj ankaŭ la duan rondon en la konkurso. Poste Kaŝi, konata kantisto de germanaj kaj internaciaj renkontiĝoj, pianoludante prezentis siajn sentoplenajn kantojn al la publiko kaj kompreneble la blinda

Hamburgano ankaŭ grimpis unu plian paŝon al la gajno.

El meza Francio venis Tatiana al norda Germanio. Partoprininte en la arta programo de la Universala Kongreso de Esperanto en Lillo ŝiaj kantoj estas konataj: Ŝi plane kantludis am-kanzonojn dum la Internacia Arta Vespero. Kaj ankaŭ la hamburga ŝlagro-kantisto Ralph Glomp prezentis kaj



en Lillo kaj en Hamburgo siajn plej novajn, memkomponitajn kantojn. Manŭel venis de Italio por klarigi sian vidpunkton pri Esperantistoj kaj ankaŭ atingis la venontan ŝtupon al la gajno.

Lastmomente la blindulino Tanja Heidmann el Hamburgo ricevis la ŝancon partopreni la konkurson kaj la publiko honorigis tion kun multe da aplaŭdo. La aŭskultantoj lernis multe pri ŝia fora amo Tino.



La Programo de Esperanto Hamburg 2015

Ĵaŭdaj klubversperoj: en *Kulturladen St. Georg*, Alexanderstraße 16, 20099 Hamburg
19:00 h la membroj kolektiĝas en la kafejo. 19:30 h vespera programo laŭ la suba listo.



La kantistaron kompletigis la kolonja „regeisto“ Jonny M, kiu muzike dankis al siaj amikoj kaj subtenantoj. Post la unua baloto, la ĵurio ja estis la publiko, Jonny M, Kapriol'!, Manŭel kaj Kaŝi rajtis kanti trian, novan kanton kaj gajni la korojn de siaj amikaroj.



Tiel estis la reguloj: tri novaj kaj propraj kantoj; tradukoj de konataj kantoj ne estis permesitaj. Post la dua balotado elkristaliĝis, ke Manŭel kaj Kapriol'! gajnis la trian rangon. Kaj nun Kaŝi kaj Jonny M devis kantbatali por atingi la unuan premion. Estis malfacila afero, nur malmulte da poentoj dividis la kantistojn, la organizantoj devis atente kalkuli kaj anoncis finfine la rezulton: Kaŝi atingis la duan rangon, Jonny M gajnis la konkurson. Gratulon!

Estis vere ekscitiga vespero por la kantistoj, la publiko kaj eĉ por la organizantoj. Kaj ĉiuj partoprenintoj gajnis pokalon kaj monpremion (1a rango 333 €, 2a rango 222 €, la aliaj 111 €). Ralph Glomp nur prenis sian pokalon kaj donacis la monon por subteni la blindulojn Tanja kaj Kaŝi, por ke ili pli facile povu vojaĝi tra Esperantujo.



Dum la venonta mateno, antaŭ ol la artistoj forvojaĝis okazis komuna matenmanĝo kun la kantistoj kaj partoprenintoj de la konkursa vespero. Entute ĉiuj sentis amikecan etoson en familia rondo.

La Programo de Esperanto Hamburg 2015

Ĵaŭdaj klubverseroj: en *Kulturladen St. Georg*, Alexanderstraße 16, 20099 Hamburg
19:00 h la membroj kolektiĝas en la kafejo. 19:30 h vespera programo laŭ la suba listo.

Oktobro 2015

1a de Oktobro 2015 **ne okazos renkontiĝo** pro Esperanto Kant-Konk-Urso je vendredo.

2a de Oktobro 2015 *Vendredo – publika – en supra granda salono ekde 19:30 h:*
Esperanto Kant-Konk-Urso

111 Jahre Esperanto in Hamburg

1. Hamburger Esperanto Kanto-Konkurso

6 Bands und Einzelkünstler im musikalischen Wettstreit.

Die Jury bist Du! Die Sieger gewinnen 111 € / 222 € / 333 €.

Eintritt 9 € / 7 € (Membroj de Esperanto Hamburg senkoste)

8a de Oktobro 2015 **Rerigardo al 1a Hamburga Esperanto Kanto-Konkurso**

15a de Oktobro 2015 *Novelo: „La piano“*
Komuna legado de novelo el MONATO de Julian Modest. Kunhavu viajn okulvitrojn.

22a de Oktobro 2015 *GraVe (Gramatika Vespero): Ĉu „igi“ aŭ ne „iĝi“ – jen la demando!*

28a de Oktobro 2015 **Merkredo 18.00 h Estrarkunveno**
Ekde kelkaj jaroj estas bona tradicio, ke ĉiu membro de HES povas partopreni kaj informi sin pri la agado de la estraro.

29a de Oktobro 2015 *La plej aĉa filmo: „La giganta araneo“*
70-minuta filmo de Christopher R. Mihm en Esperanto.

Septembro 2015

3a de Septembro 2015 *Gerald Roemer: Vojaĝimpresoj: Ha Ha — Ha — Hi — Ha!*
Hamburg-Harburg – Hameln – Hildesheim – Hamburg – kaj la Luneburga Erikejo

10a de Septembro 2015 *Astrid Lindgren: Emilo de Smolando*
Ni kune laŭtlegas „Kiam Emilo enigis la kapon en la supujon“

12a de Septembro 2015 *Sabato: “110 jaroj Esperanto en Ŝverino”*

(Tiu-ĉi nur estas informcele, ĝi ne estas oficiala ekskurso de Esperanto Hamburg)

Renkontiĝo apud la preĝejo de St. Paŭlo, Paulskirche Schwerin, Gemeinderaum, Am Packhof
8

– 10:30 h Malfermo – Franz-Peter Kurtz

– 10:45 h filmo “Perloj de la historio de Esperanto kaj en Ŝverino kaj en la regiono” – Ralf

La Programo de Esperanto Hamburg 2015

Ĵaŭdaj klubverseroj: en *Kulturladen St. Georg*, Alexanderstraße 16, 20099 Hamburg
19:00 h la membroj kolektiĝas en la kafejo. 19:30 h vespera programo laŭ la suba listo.

Kuse

- 11:15 h 98a Universala Kongreso de Esperanto en Islando 2013 – André Weber
- Tagmeza paŭzo kun gulaŝo
- 12:45 h Salutvortoj kaj raporto pri la aktuala evoluo de GEA – GEA-prezidanto Sebastian Kirf
- 13:30 h Rigardado de la preĝejo St. Paŭlo (Paulskirche) – Franz-Peter Kurtz
- 14:30 h kafoklaĉo

La kontribuo por la manĝado kaj rigardado estas planata kun 10 €. Inter la kontribuoj estas sufiĉe da tempo por babilado. Bonvolu anoncu vian partoprenon retroŝte ĉe rok.ovo@kabelmail.de ĝis la 31-a de aŭgusto por mendi ĝustanombre la tagmanĝon.

17a de Septembro 2015 *Ralph Glomp: Legomoj*

Materialo kreita de Anna Löwenstein.

19a de Septembro 2015 *Sabato: Komuna ekskurso de HES kaj EMAS al Celle*

Aktualigita programo:

8:30 Renkontiĝo en Hauptbahnhof, DB-Reisezentrum

Ekveturo 8:54 per Metronom – alveno en Celle 10:46

– 11:30 – 13:00 Urbogvidado (en la germana) tra la malnova urbo

– 13 – 14:30 Tagmeza paŭzo (itala kaj greka restoracio)

– 14:30 – 16:00/16:30 Vizito de la Franca Ĝardeno kaj de la malnova urbo

– aŭ vizito de la Bomann-muzeo – aŭ de Residenz-muzeo en la kastelo

– 16:00 – 17:00 Komuna kaftrinkado en kafejo Müller apud la parko

– Libervola plua babilado en la kafejo Müller.

Reveturado 17:06 (Hamburgo 19:02) aŭ 18:06 (20:01) aŭ 19:06 (21:01) – laŭ interkonsento, en grupoj

EHH pagos la trajnbiletojn, urbogvidadon, muzeo-enirbileton

Aliĝo eblas ĉe Gerald Roemer: [geroemer\(at\)t-online.de](mailto:geroemer(at)t-online.de)



Celle – Fotita de Gerald Roemer

La Programo de Esperanto Hamburg 2015

Ĵaŭdaj klubverseroj: en *Kulturladen St. Georg*, Alexanderstraße 16, 20099 Hamburg
19:00 h la membroj kolektiĝas en la kafejo. 19:30 h vespera programo laŭ la suba listo.

23a de Septembro 2015

Merkredo 18.00 h Estrarkunveno

Ekde kelkaj jaroj estas bona tradicio, ke ĉiu membro de HES povas partopreni kaj informi sin pri la agado de la estraro.

24a de Septembro 2015

Pia Haasis: Rare uzitaj vortoj

Kiel preparado por nia venontsemajna Esperanto Kanto-Konkurso ni enriĉigas nian vorttrezoron pri la temo „kanto-konkurso“. Ni ja ĉiuj esperas, ke ĝi funkcios bone preparita kaj ne estos kaoso. Kaj jen la ekzemplo por la vespero de Pia Haasis. Ŝi preparas literan salaton: akoos – kaoso. Ĝuu la lernadon kaj bonan apetiton.

Aŭgusto 2015

6 de Aŭgusto 2015

Post la kongreso: **Partoprenintoj raportas kaj montras iliajn fotojn kaj filmojn.**

13 de Aŭgusto 2015

Ni kune legas artikolon el la gazeto „Le monde diplomatique“: **Roza Luksemburgo** kaj alian artikolon el „La Gazeto“ pri la Esperantiston **Fernando de Diego**

20a de Aŭgusto 2015

Antaŭ la **Esperanto Kant-Konk-Urso** – La ĵurio de Esperanto Hamburg decidis pri la kantoj kaj kiu kantisto ricevos inviton por partopreni je nia konkurso.

26a de Aŭgusto 2015

Merkredo 18.00 h Estrarkunveno

Ekde kelkaj jaroj estas bona tradicio, ke ĉiu membro de HES povas partopreni kaj informi sin pri la agado de la estraro.

27a de Aŭgusto 2015

Alvaro Cortes: Du rilataj prelegoj je unu vespero: „Cloud“ – nubo, nova revolucio interrete? kaj „Reta fotoalbumo“ – vendu viajn fotojn profesie!

Julio 2015

2a de Julio 2015

Donaco-ekonomio: alia mondo eblas

Ni legas kaj diskutas tekston de Lode van de Velde el gazeto MONATO

5a de Julio 2015

Dimanĉo: **Komuna ekskurso al Delia Pick kun kaftrinkado kaj kuko en la kafejo proksime de ŝia ejo**

Renkontiĝo: Kajo 3 ĉe ĉefstacidomo je la 14:00 h. Ni prenos la S1 al Barmbek je 14:14 h. Tie ni ŝanĝos al buso 277.

Bonvolu anonciĝi vian partoprenon ĝis la 26a de Junio!

9a de Julio 2015
(1886-1988)

Zhang Fude el Ĉinujo: “La centjara historio de miaj geavoj

Prelego pri iliaj travivaĵoj kaj suferoj sub la japana militarismo kaj same de la Mao-epoko. Zhang Fude (familia nomo: ĵan, persona nomo: fude, esperanto-nomo: virto) naskiĝis en 1950 en kristana familio, diplomiĝis pri ĵurnalistiko en la universitato de Lanzhou, nun estas emerita profesoro pri multimedia instruado kaj informotekniko, memlernis Esperanton ekde 1980. Inter septembro 1983 kaj julio 1984 li progresse studis Esperanton en Pekina

La Programo de Esperanto Hamburg 2015

Ĵaŭdaj klubverseroj: en *Kulturladen St. Georg*, Alexanderstraße 16, 20099 Hamburg
19:00 h la membroj kolektiĝas en la kafejo. 19:30 h vespera programo laŭ la suba listo.

Fremdlingva Instituto ĉe la “Tria Tutlanda altlerneja Esperant-instruista kurso”, fondita kune de Ĉina Eduka Ministrejo kaj ĈEL (Ĉina Esperanto-Ligo). Li estas delegito de UEA ekde 1997, eksa konsiliano de ĈEL, vicprezidanto de Gansu-provinca Esperanto-Asocio kaj vicprezidanto de Lanzhou E-Asocio.

16a de Julio 2015 *Geomar Martínez Pérez, el Havano: Kubo – la plej granda el la Antiloj*

Kubo estas arkipelago en la Kariba maro kies geografia pozicio estis eniata dum multaj jaroj de aliaj potencaj landoj. Ankaŭ nomita „La Ŝlosilo de la Golfo“, ĝi estis kontrolita de hispanoj, angloj, usonanoj kaj ekde la 1a de januaro 1959 triumfis la kuba revolucio komandita de Fidel Castro. Per tiu ĉi prelego vi transiros la tutan kuban historion ekde 1492 ĝis la nuntempo. Ankaŭ vi ekscios kiel funkcias la lando, krom geografio, politika sistemo, ekonomio, edukado, sanservo, turismo, sporto, muziko kaj vivo tie.

22a de Julio 2015 *Merkredo Estrarkunveno NE OKAZAS pro la kongreso en Lillo*

23a de Julio 2015 *Ludwig Zamenhof: La unua kongreso de Esperanto en Bulonjo-ĉe-Mar 1905 – Ni komune legas sian paroladon.*

25 de Julio — 1 de Aŭgusto 2015 **La 100-a Universala Kongreso en Lillo, Francio**

30a de Julio 2015 **GraVe (Gramatika Vespero): La sportisto**
Gramatika testo mezgrada el la lerniloteko de edukado.net, aŭtoro Katalin Kováts.

Junio 2015

4a de Junio 2015 *Kerstin Baasch: Nia biblioteko – nova katalogo*
Jen bona novaĵo: la katalogo de nia biblioteko estas pretita. Ni prezentas la novan katalogon kaj kiel la biblioteko funkcias. Ni bonvenigas viajn demandojn kaj ideojn. Poste estos la ebleco piediri al la malnova klubdomo kaj viziti la bibliotekon.

6a de Junio 2015 *Sabato: La Esperanto-Grupo Subvisurgo festas sian 20-jaran ekzistadon kun ekskurso al Oldenburg:*

- ekde 9.50: kafejo “Café im Schloss“
- 10.20: renkontiĝo en la kastela placo
- 10.30: komenco de la ĉiĉeronado
- 12.15: tagmanĝo restoracio “Ratskeller“
- 13.30-15.00: ĉiĉeronado tra la ŝtata teatro – poste: kafejo “Café im Lambertihof“

La ĉiĉeronadoj estas senkostaj. Manĝaĵojn kaj trinkaĵojn ĉiu bonvole mem pagu (menu-elekto ankoraŭ antaŭe estos diskonigita). Aliĝo: <http://doodle.com/tqi2mk62sdhsaw3b#table> aŭ ĉe Anne Höpken: Tel. 04731-4837

11a de Junio 2015 *Mariko Aoshima: Pluvas ranoj el ĉielo*

18a de Junio 2015 *Jürgen Wulff: GraVe (Gramatika Vespero)*
Leksikaj ekskursoj: **La malvero**

La Programo de Esperanto Hamburg 2015

Ĵaŭdaj klubverseroj: en *Kulturladen St. Georg*, Alexanderstraße 16, 20099 Hamburg
19:00 h la membroj kolektiĝas en la kafejo. 19:30 h vespera programo laŭ la suba listo.

24a de Junio 2015

Merkredo 18.00 h Estrarkunveno

Ekde kelkaj jaroj estas bona tradicio, ke ĉiu membro de HES povas partopreni kaj informi sin pri la agado de la estraro.

25a de Junio 2015

Klaus Friese: William Thomas Stead

Raporto pri IF-prelego de Ian Fantom. W. T. Stead ne nur estis fama ĵurnalisto kaj kunfondinto de la Londona Esperanto-Klubo en 1903, li ankaŭ aktive kunlaboris en politikaj aferoj.

Majo 2015

7a de Majo 2015

Ralph Glomp: Tiranosaŭro. Ni laŭtleĝas informojn pri tiu interesa speco.

10a de Majo 2015

Dimanĉo: Eŭropa-tago en Norderstedt. Ni informas pri Esperanto.

14a de Majo 2015

Ĉielen-ir-tago: Komuna ekskurso al Buxtehude

9:58 h per S-trajno de Hamburga centra stacidomo al Buxtehude. Tie okazos urba rondirado gvidota de oficiala ĉiĉerono kaj komuna tagmanĝo en restoracio. Esperanto Hamburg e. V. pagos por siaj membroj la vojaĝon al Buxtehude kaj la ĉiĉironadon. Bonvolu anonci vian partoprenon per retmesaĝo aŭ telefone.

21a de Majo 2015

La Ratkaptisto el Hamelno

Laŭ malnova legendo, la Ratkaptisto estis stranga viro, kiu vivis en la urbo Hameln kaj allogis en la jaro 1284 per sia ŝalmo unue ratojn kaj musojn. Sed fine li forkondukis de la urbo 130 infanojn. Oni rakontas, ke la infanoj sekvis lin en kavernon kaj fine eliris en Transsilvanio.

22a ĝis 25a de Majo 2015 91a Germana Esperanto-Kongreso. En ratkaptista urbo Hameln

27a de Majo 2015

En Majo ne okazos Estrarkunveno

28a de Majo 2015

Post la kongreso: Partoprenintoj raportas. Bonvolu kunporti memoraĵojn kaj fotojn/filmojn.

Aprilo 2015

2a de Aprilo 2015

Memore al *Benno Klehr: Pasko kun d-ro Faŭsto en Leipzig*

9a de Aprilo 2015

Ralph Glomp: Insektoj. Ĉu vi povas nomi la insektojn kaj aliajn plurkrurulojn?

16a de Aprilo 2015

Vesna Stanicic-Burchards: 10a Europa Esperanto-Kongreso de Europa Esperanto-Unio (EEU) en Rijeka, Kroatio. Pluraj interesaj informoj.

La Programo de Esperanto Hamburg 2015

Ĵaŭdaj klubverseroj: en *Kulturladen St. Georg*, Alexanderstraße 16, 20099 Hamburg
19:00 h la membroj kolektiĝas en la kafejo. 19:30 h vespera programo laŭ la suba listo.

22a de Aprilo 2015 **Merkredo 18.00 h Estrarkunveno**

Ekde kelkaj jaroj estas bona tradicio, ke ĉiu membro de HES povas partopreni kaj informi sin pri la agado de la estraro.

23a de Aprilo 2015 *Ne-seka prelego de Gerald Roemer: Ĉu vi EMA*s trinki mozelan vinon?* Pri la Esperanto Migrado Aŭtuna 2014.

30a de Aprilo 2015 *Filmo (60 min.): Insulo de la rozoj*

La Insulo de la Rozoj, oficiale Respubliko de la Insulo de la Rozoj (itale Repubblica Esperantista dell'Isola delle Rose), estis dum mallonga tempo mikronacio sur arte-farita platformo en la Adriatiko, 11 km for de la marbordo de la provinco de Forlì, Italujo.

Marto 2015

5a de Marto 2015

Jarĉefkunveno

Ekde 19:30 h en granda salono.
Venu kaj decidu pri la aktivecoj dum la jubilea jaro 2015.

12a de Marto 2015

Dominik Grauert prezentas:
Interesaj libroj el nia biblioteko

19a de Marto 2015

Ralph Glomp: Du fortaj virinoj en Parizo - Edith Piaf kaj Marlene Dietrich
Ni kune legas interesajn informojn kaj auskultas kantojn de la du elstaraj kantistinoj.

25a de Marto 2015

Merkredo 18.00 h Estrarkunveno (publika)

26a de Marto 2015

Vesna Stanicic-Burchards:
10a Europa Esperanto-Kongreso de Europa Esperanto-Unio (EEU) en Rijeka, Kroatio. Pluraj interesaj informoj.

La Programo de Esperanto Hamburg 2015

Ĵaŭdaj klubversperoj: en *Kulturladen St. Georg*, Alexanderstraße 16, 20099 Hamburg
19:00 h la membroj kolektiĝas en la kafejo. 19:30 h vespera programo laŭ la suba listo.

Februaro 2015

5a de Februaro 2015

*Volker Kraeft kaj Dominik Grauert raportas
pri: La nova komputila kaoso*

12a de Februaro 2015 *Kerstin Baasch: Komuna laboro por
nia Esperanto-biblioteko*

19a de Februaro 2015 *Peggy Ley: 111 jara jubileo
de Esperanto Hamburg*
Lasta kaj plej grava diskutado antaŭ
la decidoj dum la jarĉefkunveno.

25a de Februaro 2015 **Merkredo 18.00 h Estrarkunveno** (publika)

26a de Februaro 2015 *Vesna Stanicic-Burchards:*
Ne timi de sed helpi al fuĝintoj!
Raporto pri la "Bonveniga teamo"
en Norderstedt.

Januaro 2015

8a de Januaro 2015

Komuna legado kun *Hannelore Brunow:*
"Münchhausen"

15a de Januaro 2015

Gerald Roemer prezentas:
Proverboj

23a de Januaro 2015 *Sonregistritaj fabeloj de la fratoj Grimm:*
**"Fabelo pri iu, kiu migris por ekkoni
timon" kaj "Fidela johano"**

28a de Januaro 2015

Merkredo 18.00 h Estrarkunveno (publika)

29a de Januaro 2015

Klaus Friese: Ni kune kantas